


Ami kaj Karlo enŜanhajo

艾米与卡罗在上海

作者：柯璟琳

审定：赵建平 俞荣康



中国国际广播出版社

中国国际广播电台人才工程资助项目

Ami kaj Karlo en Ŝanhajo

艾米与卡罗在上海

郝璟琳 著

中国国际广播出版社

图书在版编目 (CIP) 数据

艾米与卡罗在上海: 世界语汉语对照/ 褚璟琳著. —北京: 中国国际广播出版社, 2012.5
ISBN 978-7-5078-3399-7

I. ①艾… II. ①褚… III. ①世界语—汉语—对照读物
IV. ①H919.4

中国版本图书馆CIP数据核字 (2012) 第020283号

艾米与卡罗在上海

著 者	褚璟琳
责任编辑	郭 广
版式设计	国广设计室
责任校对	徐秀英
出版发行 社 址	中国国际广播出版社 (83139469 83139489[传真]) 北京复兴门外大街2号 (国家广电总局内) 邮编: 100866
网 址	www.chirp.com.cn
经 销	新华书店
印 刷	海军政治部印刷厂
开 本	850×1168 1/32
字 数	183千字
印 张	9.25
版 次	2012 年 5 月 北京第一版
印 次	2012 年 5 月 第一次印刷
书 号	ISBN 978-7-5078-3399-7/H · 387
定 价	29.80元

国际广播版图书 版权所有 盗版必究
(如果发现印装质量问题, 本社负责调换)



Ami



Karlo



Yi Lan



Huang Yue



酒吧

jiǔbā

bufedejo

小吃

xiǎochī

manĝeto

啤酒

píjiǔ

biero



逛街
打折

guàngjiē
dǎzhé

promeni sur strato
rabati



航站楼	hángzhànlóu	terminalo
机场	jīchǎng	flughaveno
经济舱	jīngjìcāng	ŝparema klaso



笔记本	bǐjìběn	portebila komputilo
修理	xiūlǐ	ripari
赔偿	péicháng	kompensi; kompenso



银行	yínháng	banko
信用卡	xìnyòngkǎ	kreditkarto
账户	zhànghù	konto

ENKONDUKO

Mi ankoraŭ memoras, ke en la komenco de la pasinta jaro Mirinda petis min skribi enkondukon por ŝia libro *Ami kaj Karlo en Pekino*, kiu celas instrui la ĉinan lingvon al tiuj, kies nacia lingvo ne estas la ĉina. Ĝi estas lernolibro, sed ne sekvas la rutinon de kutima lingva instruado. Oni lernas la lingvon dum samtempa ĝuado de la historio de paro da fremdlandaj gejunuloj Karlo, fotografisto el Francio, kiu venis al Pekino por fari foto-albumon por la kompanio, kaj Ami, studentino el Korea Respubliko, kiu studis la ĉinan lingvon en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato.

La historio komenciĝis, kelkajn monatojn antaŭ la Someraj Olimpikoj 2008, en la Internacia Flughaveno de Pekino, kie Karlo kaj Ami hazarde renkontiĝis. Karlo tuj enamigis al Ami, tute tenera kaj tipe orienta knabino, preskaŭ je la unua rigardo. De tiam iliaj spuroj troviĝis ĉie en Pekino. Kiam Karlo finis sian taskon, li adiaŭis Ami kaj forlasis Ĉinion.

Vi ne pensu, ke la historio finiĝis!

Karlo finis sian laboron en Pekino kaj revenis al Francio. La foto-albumo estis eldonita kaj ricevis multan aplaŭdon. Ami estis sendita al Fudan-Universitato, fama universitato en Ŝanhajo. Dume Mirinda forlasis nian redakcion kaj vojaĝis al Meksik-urbo, kie ŝi laboras kune kun sia edzo en la ĉina ambasado en Meksiko, en novembro de la pasinta jaro.

Mi tute ne atendis, ke en majo de la kuranta jaro

Mirinda sendis al mi manuskripton de la libro *Ami kaj Karlo en Ŝanhajo*, per kiu ŝi plu rakontas pri Karlo kaj Ami!

Ami studis en Fudan-Universitato kaj samtempe servis volontule por la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, dum Karlo, planinte kolekti per kamerao rakontojn de tiuj okcidentanoj loĝantaj en Ĉinio, venis al Ŝanhajo. La feliĉa paro denove kunigis en la moderna metropolo.

Fakte Mirinda vizitis Ŝanhajon antaŭ ili. Ŝi estis unu el la raportistoj de Ĉina Radio Internacia pri la Monda Ekspozicio. Tial ŝi bone konis Ŝanhajon. Ŝi tre bone sciis, kie estas la plej prosperaj komercaj stratoj, kie oni povas aĉeti la tradiciajn manĝaĵetojn, kiuj pavilonoj en la Ekspozicia Zono estas la plej vizitindaj, kaj kiu bufedejo sur la bufedeja strato estas la plej alloga. Ĉiujn ĉi tiujn informojn Mirinda transdonis al la juna paro. Do kiam Karlo kaj Ami sidas en Cotton's, ni kvazaŭ vidus, ke ankaŭ Mirinda troviĝas tie, trinketante ruĝan vinon ĉe la najbara tablo...

Ami kaj Karlo en Ŝanhajo estas pli ampleksa verko kompare kun la unua libro de la serio. Ĝi estas utila ne nur al tiuj fremdlandanoj, kiuj deziras lerni la ĉinan lingvon per Esperanto, sed ankaŭ al tiuj ĉinoj, kiuj volas lerni Esperanton.

Mi kredas, ke tiu ĉi libro ne estas la lasta de la serio. Mirinda certe plu verkos. Ne miru, ke iutage vi hazarde renkontus junulon en via urbo, kiu balbutas aŭ parolas flue la ĉinan lingvon al beleta orienta knabino. Tiu junulo eble estus Karlo kaj tie probable komenciĝus la nova historio de la gejunuloj!

Zhao Jianping

Sept. 18, 2011

Al mi mem-unu komencanto

Tio estas mia dua libreto, se ĝi vere estas “libro”. Mi preferas rigardi ĝin kiel mian bebon, same kiel s-ro Zhao Jianping diris en enkonduko de mia unua libro “Ami kaj Karlo en Pekino”, kiun mi akuŝis. Ĉu ĝi estas ŝi aŭ li? Mi preferas la unuan, ĉar en tiu jaro mi vere akuŝis filineton, kiu estis malforta kaj milda en miaj brakoj kaj silente rigardis min. Retrorigardante la unuan libreton, mi trovis, ke ĝi estas tiel simpla, ke ĝi ne havas belan vizaĝon nek admirindan staturon, kaj mi preparis al ŝi eĉ nenium belan veston. Novnaskiĝinta ŝi estis tiel ignorebla. Mi konfesis, ke eĉ nun mi ankoraŭ timas vizaĝi al ŝiaj okuloj. Hieraŭ mi refoje rigardis ŝin, kies rigardoj estis tiel pacaj kaj teneraj same kiel tiuj de novnaskito. Ŝi ne riproĉis min, sed komprenis min je nematureco kaj impulsigemo. 2009 estis la 9-a jaro post kiam mi ekkonis Esperanton, la 6-a post kiam mi eklernis la lingvon kaj la 5-a post kiam mi eklaboris en ĈRI. Tiam mi ankoraŭ estis akvero en la verda oceano.

Pasis ankoraŭ du jaroj, kaj finfine akuŝiĝis la dua bebo. Malgraŭ tio, ke la mieno de “ŝi”, la unua, ofte aperas antaŭ miaj okuloj, mi klopodas doni al li, la dua bebo, pli belan aspekton kaj pli interesajn enhavojn, kaj deziras, ke li estu bela kaj aminda knabo. Kiam mi promenadis en la Ekspozicia Zono aŭ en stratetoj de Ŝanhajo, mi ĉiam kunportis kun mi foton de la mia filineto, faritan ĉe ŝia unu-jariĝo, kaj ankaŭ la silentan bebon ĉiutempe en la koro. Iliaj mienoj ofte estis en mia imago, aŭ ili man-en-mane aperas en mia sonĝo kun

sopirema kaj dolĉa mieno.

Estas fakto, ke mi finfine ne donis al li multe. Ĉio kion mi elĉerpis por li estas nur ĉirkaŭ unu jaro, ripeta sendormeco kaj la sincera animo. Mi esperas, ke li havos inspiron kaj cerbon kaj estas saĝa kaj humura. Sed bedaŭrinde mi ne estas sufiĉe matura, sperta, nek saĝa, ĉio donis al mi kaj li domaĝon. Tamen li estas mia fileto, kiu ĉiam silentas, sed sufiĉe kreskigas min. Mi amas kaj dankas lin, ĉar li estas mia spuro kaj pasinteco.

Mi vere dankas tiujn fortegajn manojn, kiuj subtenis kaj helpis min survoje, ekzemple s-ro Xie Yuming, s-ro Zhao Jianping kaj s-ro Yu Rongkang. Ili propraokule vidis miajn progresojn kaj montris al mi grandan paciencon. Mi dankas ankaŭ tiujn esperantistojn, kiuj legis aŭ ne ŝatis legi la unuan aŭ ĉi tiun libreton, mi certe akiris forton ankaŭ el ili.

Kion mi faros poste, verki kaj skribi plu? Jes, kompreneble. Ĉu mi daŭrigos la rakontojn de Ami kaj Karlo? Eble jes, malgraŭ aliaj rakontoj. Mi skribas tion ĉi al mi mem kaj al tiuj, kiuj apenaŭ konas Eperanton aŭ la ĉinan lingvon, ĉar mi ofte estas unu el ili, ĉiam kiel komencanto, prudenta kaj pudora.

Mirinda(Ma Jinglin)

Aŭg. 20, 2011

ENHAVO

Ĉapitro 1

Rendevuo ĉe Waitan/约会 1

Ĉapitro 2

Vojkonsulto/问路 13

Ĉapitro 3

En Monda Ekspozicio/世博园 30

Ĉapitro 4

Luo de domo/租房 47

Ĉapitro 5

Transloĝigo/搬家 62

Ĉapitro 6

En banko/银行 78

Ĉapitro 7

En bazaro/购物 92

Ĉapitro 8

Apelacio/投诉 108

Ĉapitro 9	
En barbirejo/理发	127
Ĉapitro 10	
En bufedejo/酒吧	142
Ĉapitro 11	
Pardonpeto/道歉	160
Ĉapitro 12	
En kinejo/看电影	176
Ĉapitro 13	
Bilet-mendo/订票	190
Ĉapitro 14	
Fervoja Vojaĝo/乘火车	206
Ĉapitro 15	
Celebro/庆祝	221

SUPLEMENTO

Utilaj Informoj	241
Vortaro	247
Ĉefaj Frazoj	270

Ĉapitro 1 Rendevuo ĉe Waitan

Jam pasis prekaŭ duona horo, Ami ĉiam fiksis sian rigardon tra la fenestro eksteren, tenante preskaŭ la saman pozon senmove. Sabate, la sunlumo ŝajne estas pli varma ol ordinare. Rememorante la pasintajn tagojn, Ami sentis tiel rapidan forpason de la tempo. Antaŭ unu jaro ŝi ja unuafoje venis al Ĉinio kaj konis neniun en Ĉinio, sed nun ŝi estis sendita al Fudan-Universitato, unu el la plej famaj universitatoj en Ŝanhajo, kiel interŝanĝa studento por unu jaro.

En la pasinta jaro, Ami okupiĝis pri lernado kaj sociaj aktivadoj. Post disiĝo kun Karlo, ŝi tenis kontakton kun li nur per telefono kaj komputilo. Ŝi estis sciigita, ke la fotoalbumo de Karlo jam estis eldonita en la jarkomenco kaj ŝi ofte rakontis al li pri la universitato. Tamen ekde la pasinta duonjaro, Ami havis malpli da tempo por la kontakto kun Karlo. Antaŭ preskaŭ duonjaro, ŝi prezentis peton al la Ŝanhaja Administra Buroo por Monda Ekspozicio kaj post kelkaj ekzamenoj kaj trejniĝo, Ami finfine estis akceptita kiel laboranto de la Kore-Respublika Pavilono kaj servos por la Monda Ekspozicio en estontaj ses monatoj. Tiam Ami estis pli okupita ol antaŭe kaj mesaĝoj el Karlo maloftiĝis.

Majo estas unu el la plej belaj sezonoj en Ŝanhajo kaj eĉ la venteto ŝajne estas dolĉa. Tamen la bela pejzaĝo ne ĝojigis ŝin, ĉar ŝi riproĉis sin mem.

“Unu semajnon, jam unu semajnon.” Ŝi murmuris. Karlo sendis neniun mesaĝon al ŝi de unu semajno. Kio okazis? Ami

milde vespiris.

Matene antaŭ unu semajno, Ami ricevis la lastan mesaĝon el Karlo. Surretiĝinte, Ami funkciigis la Skajpon kaj tuj vidis mesaĝon el Karlo.

“Saluton, Ami!”

“Saluton! Kiel vi fartas?”

“Bone. Mi longtempe atendas vin. Vi aspektas iom laca, ĉu ne?”

“Jes. Pardonon. Fakte mi dormis nur du horojn hieraŭ. Nun mi ankoraŭ devas traduki multajn dokumentojn por la Monda Ekspozicio. Jam inaŭguriĝis la Ekspozico, do ni havas pliajn laborojn.”

“Ami, mi preparas donacon por vi, baldaŭ vi povos ricevi ĝin. Vi certe ŝatos ĝin. Kaj nun mi havas novan planon, ĝi estas vere grava plano por mi kaj mi jam preparis ĝin antaŭ kelkaj semajnoj...”

“Karlo, pardonon! Mi interrompas vin. Kiel lacega! Mi ankoraŭ havas rendevuon kun la profesoro post 15 minutoj. Mi preferas iom ripozi, eble venontfoje mi povas aŭskulti plu vian planon. Bone?”

Ne tuj aperis respondo sur la komputila ekrano kiel antaŭe. Sed Ami estis tiel dormema. Ŝi ne atendis respondon de Karlo kaj fermis la babil-fenestron. Laceco atakis ŝin. Sed ŝi ne atendis, ke tio estas la lasta mesaĝo el Karlo. De tiu tago, ŝi fojfoje lasis mesaĝon surrete, tamen Karlo neniam respondis.

“Li certe koleriĝis!” Ami flustris kaj refoje ĵetis rigardon ekster la fenestro. Antaŭ du semajnoj, Ami kaj alia korrespublika knabino transloĝiĝis en la Ekspozician Vilaĝon, kie koncentre loĝis diverslandaj laborantoj por la Ŝanhaja